TEA-BULTENO

5A JARO MARTO - APRILO 2002 NUMEROJ 3-4

## Vortoj de la Redakcio

### Miaj personaj konsideroj

En januaro ĉijara la Ĝenerala Asembleo kaj balotado estis okazintaj: el tio rezultis ankoraŭfoje reelektitaj la kutimaj homoj.

Prezidanto - Edvige Ackermann
Vicprezidanto - Elena Zerpini
Sekretario - Elda Doerfler
Kasisto - Giuseppe Valle
Konsilanto - Maria Rosati
Revizoroj - Amalia Zerpini kaj Elio Nocent

Nun ekestas la demando: kial tiu stagnado? Ĉu ja tiuj estas aparte bravaj kaj kapablaj? Aŭ pli simple ĉar neniu alia sin proponas kaj kanditatiĝas? Aŭ ĉar ne estas renovigo de homfortoj? Eble oni pensas, ke se ĝis nun tiu estraro bone aŭ malbone funkciis, estas neutile, eĉ malutile, ion ŝanĝi, por ne riski ke «eventuale estu petita ĝuste MIA persona engaĝiĝo». Kia ajn la respondo, estus bone iom pripensi pri la motivo de tiu situacio, jam de jaroj neŝanĝiĝanta. Tiu nova/malnova estraro havas ĉiam antaŭ si la preman problemon pri sidejo, ankoraŭ ne solvitan. Daŭre oni pritraktis tion, multon oni priparolis ĝin dum kunsidoj, dum asembleo, sed ... Kiu solvo? Estas evidente, ke ne facilas ĝin trovi, devus okazi miraklo, sed ni konsciu, ke normale, ordinare esperantistoj ne estas miraklistoj. Tamen ŝajnas al mi — sed mi esperas, ke tiu estu nura ŝajno — ke almenaŭ malmultaj el ni ĝisfunde konsideris/as la riskojn al kiuj ni estas elmetitaj se fine - post du jaroj (ja mi atentigas vin, ke je la fino de februaro 2004 ni devos forlasi la nunan loĝejon, kaj du jaroj pasas rapidege!) - ni ne sukcesos havi iun ajn ejon por nia asocio. Mi eĉ ne kuraĝas pensi, ke mankas intereso, ke ĝenerale oni juĝas ke nia asocio ne meritas plue vivadi.

Ĉu neniu el vi sin demandis, kia estus aktiveco de nia asocio, se ĝi ne plu disponus je propra sidejo, je ejoj kie okazigi kursojn, kie renkontiĝi por organizi kunvenojn, renkontiĝojn, kongresojn? Nur hipoteze pensu: kiun rezulton ni estus havintaj, se por la organizado de la 70a Itala kongreso, oni estus devinta renkontiĝi laŭvice ĉe la hejmo de tiu aŭ tiu alia TEA-ano, por la preparlaboroj, por la diskutado de la programo, por ĉio ajn kion poste ni havis je dispono por la kongreso, partoprenita de 333 personoj? Nu, bonŝance tiel ne estis, sed povus esti interese sekvi tiun rezonadon.

Do, bone, ni supozu, ke al neniu el ni interesas la sorto de baldaŭ centjaraĝa asocio. Kiu estos la elirvojo tiukaze? Tutsimpla: ni fermas ĝin, sciigas ĉiujn ke ĝi ne plu ekzistas kaj ... adiaŭ al ĉiuj! Jes, sufiĉe simple, ĉu ne? Tamen restas solvenda ankaŭ tiu ĉi eta problemo: kion fari per la materialo, la tuta asocia arkivo, la biblioteko konsistanta el pli ol 1.500 libroj, la hemeroteko konsistanta el revuoj, kies jarkolektoj komenciĝis en la 1920aj jaroj kaj multo alia? Kompreneble ke jes, oni vole-nevole devos forĵeti multajn aferojn (kaj ne diru: ni povas donaci kaj librojn, kaj revu-jarkolektojn - mi tuj respondas: kaj ĉu vi mem, el via propra poŝo, pagos la elsendo-kostojn? ĉar ne temas pri sendado de simpla letereto, certe ankaŭ vi konscias kiom pezas paperaĵoj!). Kaj pri la arkivo: tiun oni ne povas/devas donaci - nura solvo povas esti, ĝin disdividi inter la eksaj TEA-membroj, kiuj konservos ĉe si la materialon - kaj poste, post ties morto... Nu, laŭ mi, plej bone ĉion bruligi - tiel definitive malaperos el ĉi tero eĉ la memoro de la ekzisto de asocio, kiu en la belepokaj tempoj estis unu el la plej vigla kaj aktiva Esperanto-asocio en tuta Italio (kaj - eble iom fanfarone - mi eĉ povas diri unu el la plej profesiece agantaj en tuta Eŭropo).

Nu, certe jam vi estas oscedanta post legado de tiu ĉi mia prikonsiderado, tamen bonvolu elteni ankoraŭ iomete laŭlonge de kelkaj pliaj frazoj. Mi klopodis prezenti al vi bildon pri nia estonteco, sed certe vi ja estas pensanta: «Ĉion ĉi mi ja scias aŭ kapablas antaŭvidi: tial, proponu almenaŭ ian solvon». Nu, solvon mi ne havas, kelkajn ideojn eventuale, kelkajn sugestojn sed ankoraŭ ĉio ĉi sekva estas pritaksinda: eble vi rimarkis, ke en ĉi lastaj jaroj oni klopodis - ĉiam per la samaj laborfortoj - iom pli vigle agadi, organizante seminariojn, konferencojn, kongresojn. Kial? Unua fundamenta kialo kompreneble estas la disvastigo de Esperanto, kaj la dua - sed tute ne dua laŭ ordo de graveco - same fundamenta kialo estas la akiro de membroj por ebligi la ĉiutagan pluvivadon de la asocio, nome la pagadon de loĝeja lupreno, de elektra, akva, gasa, telefona fakturoj, de kostoj por purigado de la ejoj, ktp ktp. Ĉu vi opinias, ke per la nuna jara membro-kotizo oni sukcesas ĉion ĉi pagi? La sumo de membro-kotizaro sufiĉas nur por viveltено kvarmonata, kaj dum la aliaj ok monatoj, per kio oni pagus la diversajn elspezojn? Do, ĉar tiom da mecenatoj ni ne havas, oni devas klopodi aktivadi por plinombriĝo de nia asocio! Nur tiamaniere oni povas certigi la vivkontinuecon de TEA.

Kaj ni revenu al la sideja problemo: kion fari, do? Ni devas trovi aliajn ejojn kaj lupreni tiujn. Se ja en tio sin kaŝas serioza malhelpo, ĉar lu-kostoj estas neelteneblaj, nuntempe. Ne plu eblas trovi ion decan kontraŭ la sama sumo kiun ĝis nun ni pagis. Do, se oni devas pagi altajn luprezojn, estas pli bone pripensi aĉeton de sidejo. Jes, bonega solvo, mirinda ideo! Estas nur eta malperfektaĵo en tiu glata rezonado: kie ni trovas tiom da mono por ion aĉeti? Kompreneble oni petus partan monprunton al ban-

ko, sed almenaŭ ian sum(et)on ni devas havi. De la TEA-kaso jam videblas la fundo; aliaj, sufiĉe konsiderindaj enspezoj ne estas antaŭvidataj (ĉu eventuale el Loteria gajnego?), kaj do??? Se ĉiu el ni, TEA-anoj, elpoŝigus ian difinitan sumon (ĉu eble unu milionon da eks-liroj, nome 500 eŭrojn?), tiam ni povus serioze pripensi pri aĉeto de sidejo. Ĉio ĉi estas dirita tiel, simple, senkonsidere de multaj aliaj facetoj de la tuta afero, kiuj estas implicitaj, kaj sekve detale esplorindaj, ĉu same ĝi realiĝos aŭ ne, nur por klarigi tute sincere kiel statas nia situacio. Kaj je ĉi punkto mi finas: mi esperas, ke vi sukcesis finlegi la tuton kaj ke tio pripensigu vin.

Nu, rapidege la jaro 2006ª alvenos: se ni festos ĉiuj kune la centjariĝon de nia asocio aŭ se ni celebros ties funebron, tio dependos ankaŭ de VI!

*La Bulteno-redaktanto*
*Elda Doerfler*

## Programo de Marto

| | |
|---|---|
| Ven 01 | Niaj aranĝoj – Diapozitivoj de Anita |
| Mar 05 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 08 | Kartludado – Rumio kaj Trisepo |
| Mar 12 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 15 | Rumanio<br>Parolos pri sia lando Afrodita Cionchin |
| Dim 17<br>Forveturo<br>je la 8ª horo | Ĉe nia amiko Marcelo Trampuh en Istrio. En programo: vizito de Poreĉ kun li kaj ges-roj Sudec, tagmanĝo ĉe Marcelo, plantado de olivarbo, simbolo de paco… |
| Mar 19 | Ni parolu Esperante! |
| Merk→Ven<br>20→22 | Vizito de germana amiko,<br>s-ro Janek Bender |
| Ven 22 | Novaĵoj el Esperantio |
| Mar 26 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 29 | Biografio de japana esperantisto<br>Rakontos Edvige |

# Pri Eŭropo kaj eŭro jam en la 1920aj jaroj

Jam inter 1921 kaj 1933 germana esperantisto, Josef Zauner (1895-?) el Leipzig, engaĝiĝis por unueca eŭropa valuto kaj Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo (vidu ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO, 1933, p. 555). Sur la retpaĝo http://www.promeuro.org/en/products_annexes.asp eblas vidi esperantlingvan poŝtkarton eldonitan de li en Timiŝoara, Rumanio.

Germain Pirlot skribis pri tiu poŝtkarto:

"... laŭ la asocio PROMEURO, la unua konita alvoko far civitanoj por «ununura eŭropa monero» devenas el esperantistaj medioj. Fakte oni trovas tiun unuan alvokon sur poŝtkarto eldonita en Rumanio far UŜE-EĤO (Gazeto por propagandi realigon de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo), sendita al franca esperantisto (René de Lafarte en Fontenay-sous-Bois) kaj sendita el Hispanio kun la poŝtmarko de la 13ª de septembro 1934.

Tiu poŝt-karto, eldonita en Esperanto, estas fakte alvoko por Eŭropa Unio, kies traduko estas:

**Europanoj!**

1. Spite al ĉio: kredu je Eŭropo-Unio.
2. Ĉe landaj balotoj, voĉdonu nur je la favoro de tiu partio, kiu batalas por kreado de unueca ekonomi-teritorio eŭropa.
3. Propagandu kreadon de Komuna Parlamento de l' Eŭropaj naciaj parlamentoj.
4. Postulu starigon de komuna Eŭropa Armeo kaj la enkondukon de unueca Eŭropa Valuto.
5. Postulu aŭtonomiojn por la ŝtatoj, provincoj kaj urboj en Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo.
6. Lernu "Eŭrope".
7. Respektu ankaŭ la naciecon de aliaj.
8. Batalu por la malburokratigo (malŝtatigo kaj malmonopoligo) de l'ekonomio.
9. Batalu por leĝoj kaj institucioj, kiuj ebligas liberan socian kreskadon, do naturan klaso-ŝanĝon.
10. Kiu batalas por Eŭropa-Unuiĝo, akcelas la mondpacon."

Esperantistoj plenumis pioniran rolon ankaŭ rilate al la Eŭropa Unuiĝo ĝenerale, ĉar jam Zamenhof skribis en sia "Alvoko al la diplomatoj" en 1915, ke estus plej bone, se ni havus iam "Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo".

Pri komuna mono, unua iniciato tiudirekta ekhavis en Svisio René de Saussure, lingvisto kaj esperantisto. Okaze de la 3ª Universala Kongreso en Cambridge (1907), li proponis la monunuon "spesmilo", laŭ decimala monsistemo. Unu spesmilo egalis al la tiutempaj duondolaro, unu rublo, 2,50 svisaj frankoj. La germana Herbert F. Höveler realigis tiun ideon samjare kaj fondis Internacian Ĉekbankon Esperantistan kaj sistemon de transpagiloj por internaciaj monpagoj. Ĉio bedaŭrinde ĉesis funkcii tuj post la esplodo de la 1ª mondmilito.

## Startas la Brusela Komunikad-Centro

*Alvoko al ĉiuj eŭropaj esperantistoj kaj al la Landaj Asocioj*

Lingva tutmondiĝo konsistigas gravan minacon al lingvaj diverseco kaj egaleco. Uzado de naciaj lingvoj en rolo de lingvoj internaciaj pli kaj pli evidentigas malekvilibrantajn efikojn en la plej diversaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj kampoj. Ĉiuj tavoloj de la nuna tutmonda socio spertas la efikojn de lingva malegaleco.

Vole-nevole, esperantistoj estas pioniroj sur vojo al la lingva demokratio. Pro la neŭtraleco de Esperanto, ties parolantoj kaj organizoj kapablas pritrakti lingvajn problemojn sen antaŭjuĝoj. Danke al sia tutmonda komunumo, esperantistoj pli klare sentas la malekvilibrantajn soci-ekonomiajn kaj kulturajn sekvojn okaze de altrudo de naciaj lingvoj por internacia uzado. Praktikante neŭtralan solvon, esperantistoj estas pli atentaj al lingvaj malegalecoj kaj samtempe evitas naciismajn reagojn al dominantaj lingvoj.

La lingva problemo estas aparte grava en Eŭropa Unio, kiu en la venontaj jaroj pliigos la nombron de siaj membro-landoj kaj sekve la nombron de siaj lingvoj. La

tendenco estas al uzado de kelkaj laborlingvoj kun preferata rolo kompare kun la aliaj. Estas nepre necese kaj urĝe antaŭenigi en Eŭropo la komprenon pri la rolo, kiun Esperanto povus ludi por faciligi komunikadon inter eŭropanoj laŭ maniero demokrata kaj senprivilegia.

Tial UEA kaj EEU alvenis al interkonsento pri starigo en Bruselo de Komunikad-Centro, kiu disvolvu informagadon pri tiu temaro al la eŭropaj instancoj kaj al la multaj plurnaciaj ĵurnalistoj laborantaj en Bruselo.

Por funkciigi tian centron, provizora buĝeto antaŭvidas bezonon de 36.000 eŭroj por 2002. La nunaj disponeblaj monrimedoj atingas nur 17.000 eŭrojn, do estas deficito de 19.000 eŭroj. UEA konsentas garantii la kovron de tiu deficito, sed EEU klopodos malpliigi ĝin kolektante kontribuojn de landaj asocioj kaj unuopuloj.

Do, ĉiuj landaj asocioj en Eŭropo estas alvokataj kiel eble plej multe altigi sian kontribuon al EEU. Tiu kontribuo nun estas nur 0,25 eŭroj por ĉiu asociano. La Nederlanda E-Asocio kreskigis sian kontribuon al 1 eŭro por ĉiu asociano. Itala E-Federacio donis aldonan kontribuon egalan al sia ordinara kontribuo por la jaro 2001.

Ĉiuj unuopaj esperantistoj komprenantaj la gravecon de la Esperanto-agado je eŭropa nivelo estas alvokataj malavare doni sian subtenon, sendante ĝin al la konto de EEU ĉe UEA: eece-p.

## Ĝeneralaj celoj de la InformCentro

Starigi daŭran KomunikadCentron, kiu, pere de agado pri kaj por lingva egaleco kaj diverseco ĉe internaciaj kaj naciaj organizoj, politikistoj kaj ĵurnalistoj, plibonigos kaj la publikan bildon de Esperanto kaj lingvan konscion. La Brusela KomunikadCentro sekvos kaj analizos lingvopolitikajn decidojn tutmonde, agante laŭeble kun aliaj naciaj kaj internaciaj esperantaj organizoj. Centra en la laboro de la KomunikadCentro estos peresperanta agado por lingva egaleco kaj diverseco tutmonde, celanta pli konkretan bildon de la lingvo Esperanto kaj ties movadaj celoj. La centro ankaŭ detale informos esperantistojn pri sia laboro, kontribuante ankaŭ al la profesiiĝo ĉe la informada kampo de naciaj kaj internaciaj esperantaj asocioj.

La celaro de la centro plilarĝiĝos kaj pli bone difiniĝos dum la disvolviĝo de la afero, laŭ la kvanto de la homaj kaj financaj rimedoj, kiujn oni sukcesos kunmeti. Ĝi krome klopodos konkrete kaj daŭre kontribui al la tri agaddirektoj de la Strategia Laborplano 2001-2010 de UEA, nome profesiiĝo, tutmondiĝo kaj plijuniĝo, per jenaj aktivecoj:

* renovigi esperantan TTT-ejon (www.esperanto.org aŭ www.esperanto.net);
* kunlabori kun interesataj landaj asocioj por starigi regulan kaj altnivelan gazetaran komunikadservon;
* sekvi la uzadon de la vorto "Esperanto" en tutmondaj amaskomunikiloj proponante eblajn plibonigojn.

## Strukturo de la Brusela InformCentro

Estas fondata Komisiono pri Brusela KomunikadCentro (KBK), kiu konsistos el reprezentantoj de la jenaj asocioj: EEU (3 reprezentantoj), Institucio Hodler (1), BEF (1), UEA (3), la Ĝenerala Direktoro de UEA pro ofico kaj la Kasisto de EEU pro ofico. La tri reprezentantoj de EEU en la komisiono estos: Grégoire Maertens, Claude Longue-Epée kaj David Ferguson, kun la tasko de ĝenerala sekretario de EEU. La ceteraj membroj estos baldaŭ nomumataj.

**NE PROKRASTU:**
**donu vian brikon al la konstruado de nia Esperanto-Domo en Eŭropo!**

Sendu kontribuojn per ĝiro al la UEA-konto de EEU (eece-p), samtempe informante la kasiston de EEU:

S-ro Hans ten HAGEN, Middenweg 587,
NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando
ten.hagen.esperanto@wxs.nl

EL EŬROPA BULTENO N^RO 18

## Nova Ĝenerala Direktoro eklaboris

Trevor Steele, nova aganta ĝenerala direktoro de UEA, ekoficis la 1^an de januaro 2002.

Li estas entute la kvina, kiu okupas la plej superan oficistan postenon de UEA ekde 1955, kiam la Centra Oficejo translokiĝis de Britio al Roterdamo.

Trevor Steele, konata Esperantlingva verkisto, laŭ reciproka interkonsento kun la Oficeja komisiono de UEA-Estraro, estas nomumita por la periodo de unu jaro, dum kiu unu el liaj ĉefaj taskoj estos la harmoniigo de interrilatoj inter la Oficejo kaj Estraro. Intertempe li ankaŭ kontribuos al organiza restrukturigo kaj teknika modernigo de la CO.

**Nova redaktoro** Stano Marĉek, Slovakio, anstataŭanto de Istvan Ertl, pretigos la revuon hejme, rete alsendante ĝin al Roterdamo por presigo kaj ekspedado.

La 10^an de januaro finiĝis la deĵorperiodo de Pasquale Zapelli, la direktoro de la Oficejo. Tamen li plulaboris ĝis la fino de januaro, helpante pri renovigo de la komputila sistemo de la Oficejo. Parte plenigos la aperantan vakuon Ionel Onet, rumandevena usonano, kiu post plenumo de necesaj formalaĵoj iros al Nederlando por transpreni la UEA-libroservon de Simo Milojeviĉ.

## Kien post Fortalezo kaj Gotenburgo

La Estraro de UEA, kunveninta komence de januaro en Roterdamo, interalie decidis principe pri la estontaj Universalaj Kongresoj.

Por 2004 la Estraro akceptis la inviton de Ĉina Esperanto-Ligo okazigi la kongreson en Pekino. Oni antaŭvidas subtenon de la ĉina registaro kaj entuziasman kunlaboron de la ĉinaj movadanoj.

Por 2005 estis akceptita la invito de Litova Esperanto-Asocio. Tiam la 90^a Universala Kongreso de Esperanto gastos en la ĉefurbo de Litovio, Vilniuso. Ĉar en 2005 estos la centjara jubileo de la 1^a UK (tamen ne temos pri la 100^a UK, ĉar en kelkaj jaroj la kongresoj ne okazis pro la mondmilitoj), oni antaŭvidas specialan antaŭkongresan programon en Bulonjo-sur-Maro, Francio. Bedaŭrinde Bulonjo mem estas tro malgranda por gastigi modernan kongreson.

Siaflanke Litovio, proksime ligita kun la historio de Esperanto, kun elstare amasa movado, prezentas tre favorajn kondiĉojn kaj ŝtatan subtenon.

**Atentu! Atentu!**
**La 14^a Alp-Adria Esperanto-Konferenco okazos en Rijeka-Kosterna, Kroatio, de la 31^a de majo ĝis la 2^a de junio 2002.**
**Jam nun eblas aliĝi ĉe TEA-kasisto.**

## 26ª Internacia Junulara Festivalo

IEJ invitas vin al sia tradicia jara renkontiĝo, Internacia Junulara Festivalo, kiu okazos de la 27ª de marto ĝis la 2ª de aprilo 2002 en Fenestrelle (TO), Italio. Ĝia temo:

**Integriĝo de minoritatoj en Eŭropo de EUR**

Eŭropo, ekde 2002, devos sin konfronti kun la efikoj de la apero kaj uzo de komuna monunuo por multaj landoj. Ŝanĝo kiu signifos faciligojn kaj avantaĝojn, precipe ekonominivele (Eŭro malprovincigos nin, helpos nian ekonomion, favoros interŝanĝojn inter la popoloj, kontribuos al plifortiĝo de vera Eŭropa unio...); tamen ĝi kunportos ankaŭ riskojn: de nivelado kaj de renoviĝo sur la ŝultroj de la plej malfortaj.

Tiuj el ni, kiuj jam estas anoj de tiu ĉi klaso, verŝajne restos eĉ pli malantaŭe. Ĉu minoritatoj, kaj religiaj kaj lingvaj kaj kulturaj, estos malpligrandigitaj? Ĉu ili devos adaptiĝi aŭ malaperi, aŭ oni donos al ili trian eblecon? Kaj kiom tiu ebleco estos donita, kaj kiom devos esti gajnita? Kiajn ilojn Eŭro donos al tiuj minoritatoj, por sin savi? Kaj kiom longe tio daŭros? Nia intenco estas rezoni pri tiuj ĉi temoj, renkonti kaj ekkoni situaciojn kaj specifajn realojn, serĉi eblajn solvojn. Kune, por ne esti devigataj diri "mi ĉeestis (kaj nun ne plu)!" Kune, ĉirkaŭataj de la milsekretaj sonoj kiujn la arbaroj de Piemonto flustros al ni... kaj eble ni renkontos precize lin, Eŭrolo-n, la 8ªⁿ nanon...

**La Ejo** La ĉi-jara Festivalejo kontentigos vin multe pli ol la pasintjara! Temas pri luksa, ĵus renovigita hotel-eca gastejo, kie jam okazis la 18ª IJF en 1994.

Ĝi troviĝas sur flanko de montara valo, ne tro for de Torino (Piemonto, nordokcidente). La adreso estas:

Consorzio Pracatinat, Centro "E. Agnelli"
Località Pracatinat - IT-10060 Fenestrelle (TO)
tel. +39 0212 884884
Por aliĝilo kaj aliaj detaloj vizitu la paĝon:
www.esperanto.it/iej/ijf/2002/

## COMUNICATO

Primo seminario nazionale di Pubbliche relazioni organizzato dal Consigliere Nazionale della FEI, Alessandro Sarno.

**Finalità:** Aumentare il numero di associati della FEI.

**Argomenti trattati:**

- Il ciclo di comunicazione.
- Le pubbliche relazioni.
- I Sondaggi.
- Ricerca dei nominativi.
- La scala di consapevolezza da aiuto ad interesse.
- Strategie di azione.
- Il Comitato di espansione.

**Sede:** Via Santa Brigida, 64 - Napoli

**Date:** Sabato 16 marzo 2002—ore 16-20; domenica 17 marzo – ore 10-13.

**Costo:** 10 Euro a copertura delle spese per il materiale didattico che verrà distribuito.

Requisiti per la partecipazione: Volontà di contribuire alla crescita della compagine associativa della FEI e dei suoi gruppi locali. Maggiori informazioni e prenotazioni: Alessandro Sarno - Via San Domenico, 132 80126 – Napoli Tel./fax 081-2462018



## Poŝ-atlaso

En novembro 2001 Internacia Asocio MONDA TURISMO kaj Internacia Studejo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz eldonis "Poŝ-atlason de Monda Turismo".

Sur 20 koloraj paĝoj (plus kolora kovrilo) la poŝatlaso prezentas politikan dividon de la mondo, aktualan je la fino de la jaro 2001. Oni notis entute 239 landojn (suverenajn ŝtatojn kaj dependajn teritoriojn), kiuj estas registritaj de la Internacia Normiga Organizo (ISO) kaj havas apartajn simbolojn laŭ ties koncerna normo.

Indas tamen scii, ke la nombro de sendependaj ŝtatoj estas nun ĉirkaŭ 195 (nur "ĉirkaŭ", ĉar ne ĉiuj ŝtatoj reciproke sin agnoskas). Aliflanke, se oni aldonus pliajn senhomajn insulojn kaj mikro-ŝtatojn (kiel ekz. Suverena Ordeno de Maltaj Kavaliroj en Romo aŭ respubliko de monakoj sur la greka insulo Athos) kaj dividus kelkajn nur formale unuecajn teritoriojn (kiel ekz. Svalbardo kaj Jan-Majeno aŭ Usonaj Minor-Insuloj sur Pacifiko), tiam oni povus noti 270-300 landojn.

Por turistoj certe utila estos la mapo de tempozonoj. La poŝ-atlaso prezentas ankaŭ kontakt-lokojn de MONDA TURISMO en diversaj mondopartoj, kaj la centra mondmapo montras pli ol 130 landojn, al kiuj estas sendataj grupoj de ESPERANTOTUR - Turisma Servo de MT. Fakte tiuj ĉi informoj kompletigas la "Turisman Esperanto-Kalendaron 2002", en kiu troviĝas la adresoj.

Fine de la poŝatlaso estas indekso de 163 lingvoj registritaj laŭ la internacia normo n-ro 639 de ISO. Ĝi estas mendebla kontraŭ 3 USD de: MONDA TURISMO - str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio - Rete: turismo@bydg.pdi.net



### Korespondo-volo

Novbakitaj samideanoj el Suwon, Koreio, deziras korespondi kun gesamideanoj, kiuj volus aŭ povus kuraĝigi ilin. Koresponddezirantoj, bv. turni vin al S-ro KIM Young-ho, prezidanto de Suwon-a Esperanto-Filio de Korea Esperanto-Asocio. Lia retadreso estas esperanto@lge.com

**Kvizo**

En kiu jaro iĝis la verdo stelo la simbolo de Esperanto?

A. En 1887 B. En 1893 C. En 1905

Solvo de la kvizo aperinta en la januar-februara Bulteno: la vorto «kabei» signifas FORLASI LA ESPERANTO-MOVADON. Ĝi devenas de Kabe, pseŭdonimo de Kazimierz Bein: elstara verkisto, multon li influis la evoluon de la proza stilo, per sia lingvaĵo pura, klara, simpla kaj eleganta. Lia plej fama traduko estas LA FARAONO de Prus. Pro kialoj entute neklaraj, abrupte li forlasis la movadon jam en 1911.

***Enhavo de ĉi tiu Bulteno ŝuldeblas al RET-INFO, NOVA SENTO kaj NUN***


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349